

komuna organo de KANSAJA LIGO de ESPERANTO-GRUPOJ KJUSIA ESPERANTO-LIGO, ESPERANTO-LIGO de TYUGOKU kaj SIKOKU

La Movado

komuna organo de KANSAJA LIGO de ESPERANTO-GRUPOJ KJUSIA ESPERANTO-LIGO, ESPERANTO-LIGO de TYUGOKU kaj SIKOKU

Fondita en 1951 N-ro 812 oktobro 2018

komuna organo de:

KANSAJA LIGO de ESPERANTO-GRUPOJ
Sone-higasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Ôsaka-hu, 561-0802
KJUŜUA ESPERANTO-LIGO
2-190, ŜISAIDO, TARAMI-ĈO, ISAHAYA-ŜI, NAGASAKI,
859-0407, MORIWAKI Yasumasa

ESPERANTO-LIGO de TYUGOKU kaj SIKOKU
Kannonmen 14-1, Kusiki, Kitanada-tyô, Naruto-si,
Tokusima-ken, 771-0371, KITANI Tomoko

En varmeĝo okazis la 103-a UK.....	TAKUMA Kenzi 1-2
楽しい作文教室 (86).....	塚本 猛 3
Kajero Libervola: Amikeco inter Pollando kaj Japanio	
.....	FUKUDA Makoto 4
対訳: 鹿殺し裁判.....	島谷 剛 5
対訳: 源氏物語 第17帖 絵合 (4)	
.....	紫式部 / belmonto 6-7
SAT-kongreso kun abunda enhavo...TAHIRA Masako	8-9
初心者のための語尾なし単語の使い方 (70) ..相川 節子	9
Miaj trezoroj gajnitaj en la UK en Lisbono	
.....	TOMIDA Narumi 10
小西岳さん追悼: 「エスペラント讃歌」のエスペラント訳	
.....	伊藤 照子 10
Dan-ŝa-ri kaj Mottainai.....	EGAWA Harukuni 11
Kurantaj vortoj	11
日韓共同開催大会講師紹介.....	12
La Movado: ロンドの活動ほか.....	12-13
訃報: 佐々木安子さん.....	13
ポルトガル語会話帳プロジェクト報告.....	佐野寛 13
Vortkruca enigma / 作文教室成績	14
Mikspoto / 作文教室課題 / KLEG 事務局だより.....	15
編集ノート.....	16

En varmeĝo okazis la 103-a Universala Kongreso

La 103-a Universala Kongreso havis lokon en Lisbono, Portugalio ekde la 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto sub la kongresa temo “Kulturoj, lingvoj, tutmondiĝo: Kien nun?”. La kongresejo estis la konstruaĵoj de la Universitato de Lisbono sed la Solena Inaŭguro kaj Nacia Vespero okazis en *Coliseu dos Recreios* (konstruaĵo kiel ronda teatro) kiel kutime nomata la salono Zamenhof, kiu situas malproksime ĉirkaŭ 4 km laŭ rektlinia distanco de la universitato.

En la kongreso partoprenis 1567 personoj el 73 landoj. La plej multaj partoprenantoj el unu lando estis 250 el Francio, la dua 133 el



La Movado 812

TAKUMA Kenzi (Nara) Brazilo, la tria 126 el Germanio kaj la kvara 92 el Japanio, kaj el la kongresa lando Portugalio ne tre multaj partoprenis (la oka 46 personoj).

En la antaŭa duono da la kongresaj tagoj estis ne tre varmeĝe, sed en la posta duono estis tro tro varmeĝe. Tial la kongresa kuriero “Taĝo Nia” n-ro 4 eldonita 31an de julio avertis jene:

VENOS VARMA VETERO!

Oni prognozas dumtagan varmecon de 39-41°C por ĵaŭdo ĝis sabato, poste malpli. Kongresanoj b.v. atenti pri la jeno:

Ne tro vestiĝu!

Flankenlasu jakojn ks.

Trinku akvon abunde!

(la kranakvo trinkeblas)

Ne restu ĉe la suno,

preferu ombrajn lokojn.

Movada Foiro

Antaŭvespere je 19:00 komenciĝis Movada Foiro interne de domo ĉi-jare. Multe da

grupoj ekspoziciis diversaĵojn kaj klarigis siajn aktivadojn al preterirantoj kaj venantoj en malvasta loko. Ankaŭ JEI havis budon, kie s-ro *KIMOTO Yasuhiro*, la estro de la Loka Kongresa Komitato alvokis partopreni en la Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio kaj disdonis flugfoliojn. Ankaŭ mi helpis lin. Meze de la tempo fluis sono de muzikaj instrumentoj. Jen faduo komenciĝis, sed bedaŭrinde mi ne bone aŭskultis, ĉar interparolantaj voĉoj de multe da homoj kovris la sonojn de la instrumento. Faduo ne taŭgis en Movada Foiro.

Solena Inaŭguro

La estraranoj de UEA ktp. sidiĝis sur seĝojn sur la scenejo de la salono Zamenhof kaj malfermiĝis Solena Inaŭguro. Laŭ la kutimo Prezidanto *Mark Fettes* prezidis Inaŭguron. Li prezentis altajn protektantojn, kaj sekvis salutoj, salutomesaĝoj kaj festparolado de la prezidanto. La filino de *L. C. Zaleski-Zamenhof* ĉeestis kaj salutis. En muzika paŭzo gitaristoj ludis faduojn. Reprezentantoj de ĉeestantaj landoj salutis per mallongaj frazoj, kaj la japana reprezentanto estis s-ro *Ito Toŝihiko*.

Nacia Vespero

Tri kantistoj alterne kantis faduojn kun ludo de gitaroj (portugala gitaro kaj klasika gitaro). Kaj sekvis folkloraj muzikoj kaj dancoj. Sur la scenejo multe da ludantoj vigle dancante moviĝis tien kaj reen. En la lasta parto la ludantoj invitis spektantojn veni sur la scenejon, kaj ili kune dancis.

Kleriga Lundo

Samtempe en 5 ĉambroj oni faris 90-minutajn prelegojn aŭ lecionojn kaj tio ripetiĝis 3 fojojn. Do entute 15 prelegoj aŭ lecionoj. Mi intencis ĉeesti en 2,3 prelegojn, sed kiam mi mendis ekskursojn, mi tute forgesis Klerigan Lundon, kaj mendis duontagan ekskurson de la sama tago. Tial mi ĉeestis en neniu Kleriga Lundo, anstataŭe mi vizitis la kastelon *Palmela* kaj vinfarejon kaj 2018.10

tie gustumis tipan regionan vinon Moskatelo. Ho, tre bongusta!

Koncerto: Kariljono



La koncertoj nombris 15, unu el ili estis kariljona koncerto. S-ro *Jo Haazen*, kiu estas unu el la plej famaj kariljonistoj de la mondo kaj aktivulo de nia movado, koncertis en la placo de Municipo. Li ludis sur speciala kamiono kun 63 sonoriloj, kaj iuj ajn urbanoj kaj turistoj povis aŭskulti la koncerton. Kiam li ludis, subite ambulanco kuris sur strato hurlante sirenon kun granda sono. Ho, ve! la muziko fiaksis!

S-ro *Jo Haazen* venis al *Ôsaka* por ludi kariljonon en la parado de la strato *Midôsuji* en 1983.

Internacia Arta Vespero

En la lasta vespero (3-an) okazis Internacia Arta Vespero. Kandidatoj kun bela voĉo aŭ lerta tekniko de danco aŭ muzika instrumento el diversaj landoj estis elektitaj per la provludado. Nur ili povis stari sur la podio. Sed bedaŭrinde ĉi-jare neniu japano surpodiiĝis.

Solena Fermo

En la solena fermo multaj honoradoj estis faritaj. S-ino *Katalin Kováts* gajnis Premion *Onisaburo Deguĉi*, kiu estis starigita en la Jubilea Jaro 1987 per kapitalo donacita de Oomoto. 14 elstaraj agantoj estis diplomitaj, inter ili s-ino *TAHIRA Masako* kaj s-ro *Sun Mingxiao* (Ĉinio) estis diplomitaj.

En la lasta parto de Fermo la standardo estis transdonita al la LKK de la venonta kongresurbo *Lahti*, Finnlando.



①彼はその猫をキーボードの上から持ち上げる。

【訳例 1】 Li levas la katon de sur la klavaro. (Yo, Ivajo, ikona, Fumi, haveno)

【訳例 2】 Li levas la katon de sur klavaro. (CA, ヒー坊)

【訳例 3】 Li levas la katon de la klavaro. ([対格修正]Celejo)

「その猫」は、la kato でいいでしょう。以前にも出た「猫」と考えれば、tiu (その) などを使わなくてもいいと思います。「キーボード」には、klavaro(キーボード)が使えます。「~の上から」は、前置詞を組み合わせた de sur で表現できます。de や el と組み合わせた例には、de ĉirkaŭ (~のまわりから)、el inter (~のうちから)、時間的な意味の de post (~の後) などがあります。

desupre (上から、高みから) を使う例がありましたが、副詞なので単独では de sur を置き換えられません。desupre de la klavaro のようにします。意味的には、「キーボードの高いところから」でしょうか。題意には合わないようです。

②彼はその猫の気まぐれを大目に見る。

【訳例 1】 Li toleras la kapricon de la kato. (Yo, Celejo, Ivajo, Fumi)

【訳例 2】 Li toleras kapricon de la kato. (Eiko, CA, ヒー坊)

【訳例 3】 Li estas tolerema pri ĝia kaprico. (ikona) 容認する：toleri ion.

「気まぐれ」は、定まった考えがなく思いつきで行動するさま、変わりやすくて予測できないさまを言います。kaprico(気まぐれ)が対応するでしょう。用例には sensencaj kapricoj (ばかげた気まぐれ)、kaprica pluvo (にわか雨) などがあります。なお、arbitra (勝手気ままな、任意の) は、誰かの意思や気まぐれに依存するさまです。

「大目に見る」は、人の過失や欠点を厳しくとがめず、寛大に扱うという意味です。toleri ion(容認する) や pardoni (許す、勘弁する) で表現できるでしょう。indulgi (罪・過ちを容赦する) だ

と大げさな感じがします。

③彼はプログラムをパソコンにインストールする。

【訳例 1】 Li instalas la programon en la komputilon. (Celejo, T.Ku)

【訳例 2】 Li instalas programon en sian komputilon. (CA)

【訳例 3】 Li instalas programon en personan komputilon. (Ivajo)

「プログラム」には programo (番組表) が使えます。これは、コンピューター用の処理手順書のようなものです。コンピューターは、この手順書に記述された条件に従って作動します。

「インストールする」には、instali ion (設置する) が使えます。これは、コンピューター内部の memorilo (記憶装置) にプログラムを書き込んでおき、lanĉi (立ち上げる)、または ekfunkciigi (起動する) すれば使えるように準備することです。

「パソコンに」ですが、設置するのは決まった場所なので、場所を示す前置詞を使うのが適切でしょう。ここでは en を使っていますが、sur la diskon de la komputilo のような用例もあります。

④猫は何か画面を動いているのを見る。

【訳例 1】 La kato vidas ion moviĝantan sur la ekrano. (Eiko, Ivajo) 解説

【訳例 2】 Li vidas ion moviĝanta sur la ekrano. (Fumi) 解説

【訳例 3】 La kato observas, ke io moviĝas sur la ekrano. (Yo)

動かす：movi ion ien.

この「猫」は、何度も出ているので ĝi や ŝi でもいいでしょう。ただし、人の「彼」と区別できないので、li は避ける方がいいと思います。

「画面」はパソコンの画面であり、ekrano (スクリーン、画面) を使えます。tuŝekrano (タッチスクリーン) や likvakristala ekrano (液晶画面)、ekrankopio (スクリーンショット) などの用例があります。vidigilo (表示装置) の一種です。

「動いている」には、moviĝi (動く) が使えます。訳例 1 では訳例 2 と異なり、moviĝantan と -n を付加していますが、意味が ke 節に対応する場合は不要です。文法書 PMEG によれば、意味が kiam 節に対応する場合だけ -n を付加するようです。

成績は p.14、新しい課題は p.15

約百年前のポーランド孤児救出秘話は、両国の友好の歴史の礎となり、民間交流は世代を超えて今に続いている。

En novembro de 1918, la sekvantan jaron de la Rusia Revolucio sendependiĝis Pollando. Tiam multaj poloj estis detenitaj en rusia grundo kaj la registaro de Pollando intencis savi ilin. Frontante malfacilecon Pollando volis revenigi almenaŭ samlandanajn orfojn, kiuj estis en mizera kondiĉo en Siberio, kaj petis helpon de eŭropaj landoj kaj Usono. Sed, ĉiuj landoj rifuzis la peton. Fine poloj decidis petegi de Japanio sen multe da espero.

Japanio, kvankam suferis ekonomian depresion post la unua mondmilito, akceptis ĝin. La registaro de Japanio kunlaborinte kun Japana Ruĝa Kruco savis 765 polajn geknabojn kaj ili elŝipiĝis en Japanio dum du jaroj ekde 1920. Japanoj, malgraŭ ke plejparte de la popoloj estis malriĉaj tiam, donacis monon, dolĉaĵojn, ludilojn ktp kaj oferis senpagajn servojn. Baldaŭ malnutradaj kaj malsanaj infanoj tute resaniĝis ne nur fizike sed ankaŭ emocie. Onidire kelkaj malgrandaj infanoj ne volis enŝipiĝi al hejmlando kaj laŭte ploris. Ilia vivo en Japanio fariĝis neforgeseblaj memoraĵoj. Do, tio estas resumo de la historio de polaj orfoj.

Mi aŭdis, ke tiu historio estas skribitaj en lernolibroj en Pollando kaj ĉiuj poloj scias pri tio. Tial multe da poloj admiras Japanion. “Ĉu tio estas vera?”, mi volis konfirmi ĝin persone pere de iu el Pollando. Hazarde mi ekkonis polan studentinon, kiu estas en doktora kurso de bromatologio* ĉe Universitato de Kjuŝuo. Mi demandis ŝin ĉu estas vere, ke ĉiuj poloj scias pri tiu epizodo. *Ola* (kromnomo de *Aleksandra*) respondis ke jes. Ŝi lernis pri ĝi en lernejo kaj ŝia patrino rakontis

pri tiu historio kiam *Ola* estis knabino. Ŝia patrino estis membro de Sendependa Aŭtonomeca Sindikato “Solidareco”, iama neleĝa organizo, kaj laboris kiel fotisto de la sindikato. Ŝi zorgeme subtenadas distancon kun siaj familianoj kaj parencoj evitante iliajn riskojn kaj faradis subteran aktivadon. Poste demokratiigo ŝanĝis tutan situacion kaj naskiĝis *Ola* kiel sola filino inter feliĉaj geedzoj. “Mi ne tute povis imagi pri mia edzineco nek patriniĝi en tiu tempo”, la patrino de *Ola* iam rakontis al sia filino. Nuntempe oni povas sendi retmesaĝojn kaj babili rigardante la vizaĝon de la alia. Tamen, oni imagas, ke estis tre malfacile por la geedzoj permesi solan filinon transloĝi en malproksiman landon de Orienta Azio. Verŝajne dank’ al ilia admiro al Japanio *Ola* povis veni al Japanio. Emociiĝante mi guglis kaj trovis rilatajn informojn. Post la grandega tertremo, kiu okazis en Kansaja regiono en 1995, Pollando invitis ĉirkaŭ sesdek japanajn orfojn, kiuj suferis pro la katastrofo. En Pollando tiuj geknaboj havis ŝancon renkonti eks-orfojn. Postvivantoj rakontis pri siaj spertoj en Japanio al japanaj infanoj. Onidire la renkontiĝejo estis plena de amo kaj emocio. Ankaŭ post la katastrofo, kiu okazis en la jaro 2011 en Nordorienta parto de Japanio, tridek japanaj mezlernejaj lernantoj vizitis dum du semajnoj Pollandon en somero de tiu jaro. La ponto inter du popoloj neniam difektas. Tre bedaŭrinde en Japanio malmultaj scias pri tiu rilato inter la du landoj.

Malmultaj japanoj scias ke poloj ŝatas Japanion kaj kial ili admiras nian landon. Tio estas unu el bonaj ekzemploj de historio de nekonataj personoj, kiuj influis la mondon. Mi kredas, ke ankaŭ japanaj studentoj kaj lernantoj devas lerni pri tiu historio, ĉar scioj pri ĝi fekundigas bonan rilaton inter la du popoloj.

*bromatologio: scienco pri manĝaĵoj

Murdo de Cervo

rerakontis SIMATANI Takesi

Antaŭ multaj jaroj frumatene en *Nara*, iama metropolo de Japanio, mastro de tohua* vendejo trovis hundon manĝanta sojan rekremento**. Li volis forpeli la hundon kaj ĵetis brullignon, kiu hazarde trafis la kapon kaj mortigis la hundon. Nur tiam li trovis, ke la besto ne estas hundo, sed cervo. La tohuisto ja faris gravan krimon mortigi cervon.

En *Nara* oni kredis, ke cervo estas sendito de Dio de la Granda Templo *Kasuga*. Murdinto de cervo devis esti ekzekutita.

Pastro de la Granda Templo *Kasuga* akuzis lin al tribunalo. La juĝisto atente ekzamenis la kadavron kaj rimarkis. “Vi asertis, ke oni mortigis Dian cervon. La besto tamen estas hundo.”

La pastro koleris. “Ha, Via Moŝto! Neniu hundo havas kornojn kaj hufojn.”

La juĝisto ne cedis. “Kvankam kun kornoj kaj hufoj, mi vidas ĝin hundo. Por nutri Diajn cervojn la Granda Templo *Kasuga* ĉiujare ricevas grandan sumon de Ŝoguna Registaro. Kun sufiĉa nutraĵo cervo ne eliras el la Sanktejo. Se cervo tamen eliras kaj ŝtelas manĝaĵon en strato, tio pruvas ke vi pastroj proprigas al vi la sumon, sed ne nutras cervojn. Se la besto estas cervo, la Templo respondecas pri la morto. Ĉu vi asertas plu, ke ĝi estas cervo?”

La pastro nuligis la akuzon. La juĝisto avertis la tohuiston. “Kvankam ĝi estas hundo, vi devas bone zorgi pri vivaĵo.”

* **tohuo** (豆腐): manĝaĵo farita el sojfaboj.

****soja rekremento** (おから) estas kromprodukto de tohuo.

鹿殺し裁判

再話：島谷 剛 (大阪府)

昔、日本の都だった奈良のことです。ある朝、豆腐屋の主人が早起きして店を開けていると、犬がおからを食べているのを見つけました。主人は犬を追い払おうと、薪を投げつけました。薪はたまたま頭に当たって、犬は死んでしまいました。よくよく見ると犬だと思った動物は犬ではなくて、なんと鹿でした。豆腐屋は鹿殺しの大罪を犯してしまったのです。


奈良の鹿は春日大社の神様の、大切なお使いと信じられていました。鹿を殺してしまった人は死刑になりました。

春日大社の社人が奉行所へ訴え出ました。奉行は、なきがらを取り寄せ、じっくりと検分した上で、「訴状では神様に仕える鹿が殺された、とあるが、この死んでいる動物は、ただの犬ではないか」と言いました。

社人は、怒りました。「お奉行様、犬に角(つ)や蹄(ひづめ)は御座いません。」

奉行は譲りません。「たとえ角や蹄があっても、自分の見るところでは犬に間違いないぞ。春日大社は神鹿の餌代として大金を毎年幕府からもらっているではないか。十分に餌があれば、鹿は境内から出て行かないはずじゃ。もし鹿が境内から町中へ出て餌をあざったというなら、社人が私腹を肥やしていて、鹿に十分な餌をやらなかったということになるではないか。これが鹿だというなら、鹿が死んだ責任は神社にある。それでも、なお、鹿であると申すか。」

社人は訴えを取り下げました。奉行は豆腐屋に「たとえ犬でも、生き物を粗末に扱わぬよう、よく気をつけよ。」と注意しました。



編集部注：
この話は「鹿政談」という落語で知られています。

El “Rakontaro Genĝi”, 11-a jarcento

源氏物語 第 17 帖 絵合 糸あはせ

We-Afase – Pentrajkonkuro (4)

eljapanigis belmonto

“Vivis mi en Urbo sola
Kun malĝojo senkonsola
Via vivo ĉe marbordo
Bilde gvidus min en ordo

Tiam mia maltrankvilo estus mildigita!”

En la utao, *Genĝi* trovis ŝian ĉarmon.

Pli da larmoj ekfaletas
Ol antaŭo nun pli dense
Ire al pasint' mi tretas
Apud maro senintence

Tiujn pentraĵojn nepre devus vidi la eksa mikadino Visterio, kiuj entenas ilian sekreton, agnoskotan nur de ambaŭ. Li elektis bildokajerojn de *Suma* kaj *Akaŝi* po unu, en kiuj estis pentritaj la serenaj scenoj de la marbordoj, ne facile forlaseblaj. Tiam li ne povis ĉesi rememori, kiel vivas nun tieaj homoj en *Akaŝi*.

La Provizora *Ĉiŭnagono* aŭdis, ke *Genĝi* kolektas pentraĵojn multe, kaj nun ankaŭ li fariĝis entuziasma; li elfarigis belajn aksojn de rulaĵoj, kovrilajn paperojn, kaj bindoŝnurojn. La tago estis ĉirkaŭ la deka de luna marto, kaj la vetero estis serena. Oni sentis sin libera kaj freŝa; tiel bona estis la sezono. En la palaco ne estis gravaj eventoj, pro tio ĉiuj ĝuis tagojn en tia amuzaĵo. *Genĝi* ekpensis, ke li donos pli fascinajn pentraĵojn al Mikado, kiam li donacos, kaj kolektis multe kun fervoro. Diversaj bildoj estis kolekte metitaj en lian ĉambbron kaj ankaŭ en la ĉambbron de la *niogo*. Precipe rakontobildoj esprimis la korojn precize, kaj logis al sopiro. La *niogo* de la ĉambro Mumeo kolektis ĉiujn antikvajn kaj famajn rakontojn, dum la *niogo Kokiden* elektis la furorajn modernajn rakontojn kaj pentrigis ilin. Tial la pentraĵoj de la lasta estis freŝaj kaj supere pompaj al okuloj de rigandantoj. Eĉ la ĉambelaninoj de Mikado, kiuj estas kleraj en ĉi tiu arto, ĉiutage kritikis tiun kaj tiun ĉi

「ひとりゐて
嘆きしよりはあまのすむ
かたをかくてぞ
見るべかりける

おぼつかなさは、慰みなましものを」

とのたまふ。いとあはれと思して、

うきめ見し
そのをりよりも今日はまた
過ぎにしかたに
かへる涙か

中宮ばかりには、見せてたまつるべきものなり。かたはなるまじき一帖（でふ）づつ、さすがに浦々のありさまさやかに見えたるを選びたまふついでにも、かの明石の家みぞ、まづいかにと申しやらぬ時の間（ま）なき。

かう絵ども集めらると聞きたまひて、権中納言いとど心を尽くして、軸（ちく）、表紙、紐（ひも）の飾（かざり）、いよいよとのへたまふ。三月（やよひ）の十日のほどなれば、空もうらかにて、人の心ものび、ものおもしろきをりなるに、内裏（うち）わたりも、節会（せちゑ）どものひまなれば、ただかやうの事どもにて、御方々（かたがた）暮らしたまふを、同じくは、御覧じどころもまさりぬべくて奉らむの御心つきて、いとわざと集めまゐらせたまへり。こなたかなたとさまざまに多かり。物語絵はこまやかに、なつかしさまさるめるを、梅壺（むめつぼ）の御方は、いにしへの物語、名高くゆゑあるかぎり、弘徽殿（こきでん）は、そのころ世にめづらしく、をかしきかぎりを選び描かせたまへれば、うち見る目の今めかしき華やかさは、いとこよなくまされり。上（うへ）の女房なども、よしあるかぎり、これはかれはなど定めあへるを、このごろの事にすめり。

reciproke.

6) pentraĵkonkuro antaŭ Viserio

La eksa mikadino Visterio restis en la palaco, kaj rigardadis tiujn pentraĵojn, ne povinte preterlasi, eĉ maldiligente servante al Budho. Ŝi aŭdis la diversajn kritikojn de la ĉambelaninoj de Mikado, kaj dividis ilin en du grupojn, nome dekstra kaj maldekstra. En la maldekstra grupo de la *niogo* Mumeo estis la vicestrino de *najŝi Fej*, *najŝi Ŝifu*, kaj la oficistino *Seŭŝauŭ*, dum en la dekstra grupo de la *niogo* *Kokiden* estis la vicestrino de *najŝi Dajni*, kaj la oficistinoj *Ĉiŭŝauŭ* kaj *Fjaŭve*. Ili estis la talentaj specialistoj, kaj disputis kun ŝaŭmoj sur la buŝoj. Visterio aŭskultis tion interesa, kaj metis en konkuron kontraste la 'Rakonton de la Bambuhakanto', la origino de la tuta rakontaro, kun la ambasadoro 'Toŝikage' en la Rakonto de *Utufu*.

La maldekstra grupo opiniis.

“Certe, la 'juna bambuo' jam fariĝis maljuna dum generacioj, descendante de la antikvo, sed la princino *Kaguja* ne estis infektita de putrado de ĉi tiu socio, kaj la promeso supreniri la ĉielon estas nobla. Tio okazis en la dia epoko, kaj tial superos la fantazion de malprudentaj virinoj.”

La dekstra flanko refutis.

“La princino *Kaguja* supreniris al la ĉielo, kien neniu povus viziti kaj scii, ĉu tiu vere okazis. Ŝi naskiĝis en bambuo kiel ligiĝo kun nia socio, pro tio ŝi ŝajnas malnobla filino. Certe, la lumo pleniĝis en ŝia tuta domo pro ŝi, sed tiu estas tute ne komparebla kun la palaco, centoble brila. La dekstra ministro *Abe* perdis milojn da oro, kiam brulis la pelto de fajra rato, kiun li aĉetis. Tiam lia amo al ŝi perdiĝis en momento. La princo *Kuramoti*, bone kompreninte, ke li ne povos atingi la magian monton *Penglai*, produktigis falsan juvelbranĉon kaj malaltigis ĝian veran valoron. Tiu estas lia difekto.”

(daŭrigota)

中宮も参らせたまへるころにて、かたがた御覧じ棄てがたく思ほすことなれば、御行ひも怠りつつ御覧ず。この人々のとりどりに論(ろん)ずるを聞こしめして、左右(ひだりみぎ)と方分(かたわ)かたせたまふ。梅壺(むめつぼ)の御方(かた)には、平(へい)典侍(ないしのすけ)、侍従(じじゅう)の内侍(ないし)、少将命婦(みょうふ)、右には大弐(だいに)の典侍(ないしのすけ)、中将命婦、兵衛(ひょうゑ)の命婦をただ今は心にくき有職(いうそく)どもにて、心心にあらそふ口つきどもををかしと聞こしめして、まづ、物語の出で来はじめの親なる竹取(たけとり)の翁(おきな)に宇津保(うつほ)の俊蔭(としかげ)を合はせてあらそふ。

「なよ竹の世々に古(ふ)りにける事をかしきふしもなければ、かぐや姫のこの世の濁りにも穢(けが)れず、はるかに思ひのぼれる契(ちぎ)りたかく、神世(かみよ)のことなめれば、浅はかなる女、目及ばぬならむかし」

と言ふ。右は、

「かぐや姫の上(のぼ)りけむ雲るはげに及ばぬことなれば、誰も知りがたし。この世の契りは竹の中に結びければ、下(くだ)れる人のことこそは見ゆめれ。ひとつ家(いへ)の内は照らしけめど、ももしきのかしこき御光には並(なら)はずなりにけり。阿倍(あべ)のおほしが千々(ちぢ)の金(こがね)を棄てて、火鼠(ひねずみ)の思ひ片時に消えたるもいとあへなし。車持(くらもち)の親王(みこ)の、まことの蓬萊(ほうらい)の深き心も知りながら、いつはりて玉の枝に瑕(きず)をつけたるを、あやまちとなす」
(続く)

SAT-Kongreso kun abunda enhavo

TAHIRA Masako (Kioto)

Post la 103a UK en Lisbono, Portugalio (07/28-8/04), mi kun la edzo *Minoru* kaj *Nagase Yosikatu* partoprenis en la 91a SAT-kongreso en *Kragujevac*, Serbio (8/05-8/12). De Lisbono al Beogrado ni flugis, poste veturis buse pli ol 2 horojn, laste taksie al SAT-kongresejo. Tre oportunis, ke la kongresejo kaj la loĝejo samis en "Hotelo Kragujevac". SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) movadas per Esperanto, dum UEA movadas por Esperanto. La kongreso havis temon "Esperanto kaj transnacia komunikado en la inform-teknologia epoko".

Aliĝis 83 kamaradoj el Serbio, Svisio, Hispanio, Francio, Bosnio-Hercegovino, Kroatio, Germanio, Britio, Nederlando, Pollando, Finnlando, Bulgario, Aŭstralio, Kubo, Kanado, Senegalio, Madagaskaro, Ĉinio, Sudkoreio kaj Japanio inkluzive de ne-partoprenintoj pro problemoj pri vizo aŭ io.

Surprizis min, ke unumonata Esperantolernanto estis unu el Organiza Kongresa Komitato (OKK) kaj bone parolis Esperanton.

La prezidanto de la OKK estis *Saša Pilipoviĉ*, fame konata kantisto kaj koncertis pri ciganaj kantoj. Ankaŭ aliaj kantistoj min ĝojigis: *Georgo Handzlik* kun filino *Dominika* el Pollando, kaj *jOmO (Jean-Marc Leclercq)* el Francio, kiu iam gastis ĉe mi. Mi ne povis ne danci, kiam *jOmO* koncertis. *Saša* kun *Georgo* aktorisis en teatraĵo "La Kredito". Kiel spertas ili en ĉio!

En la hotelo manĝaĵoj multis. Grandaj viandoj aŭ grandaj fiŝoj kun monto da legomoj venis. Mi ne ŝatas restigi ne-manĝitan pro ŝparemo, do mendis nur unu porcion por mi kun *Minoru*, aŭ vegetaran menuon. Vegetaranoj kaj veganoj ne mankis inter la kongresanoj. Ankaŭ deserto estis granda kaj dolĉa. Veganoj ne manĝis deserton, ĉar laktaĵo estas malveganaĵo.

2018.10

En la kongreso partoprenis diversaj kamaradoj: komunisto, socialisto, anarkiisto, liberpensulo(mi), kristano, ateisto(mi), ĵurnalisto, ekologiisto, instruisto, flegisto, lingvisto, kudristo, artisto, emerito, senlaborulo(mi) ktp. Mirindis, ke ĉiuj estas bonaj parolantoj de Esperanto. Eble hazarde al ĉi-jara kongreso ne venis komencantoj?

Interkonatiĝa Vespero interesis min. De alia homo prezentita homo prezentu sin mem kaj samtempe prezentu alian homon.

Libroservo ĉiutage funkciis kun novaj kaj malnovaj libroj. Nacia Vespero okazis kun orkestro kaj dancistoj surlokaĵ. Kiom pompe ili muzikis kaj dancis!

Kelkaj ekskursoj okazis. Mi partoprenis: "Historia kerno de *Kragujevac*", "*Resava* (monakejo, kaverno, akvofalo)", "Memorparko *Ŝumarice*, dediĉita al kelkmil viktimoj de nazia teroro".

En Malfermo salutis la urbestro kaj skabeno pri kulturo kun interpreto. Ni silente omaĝis al Terezija Kapista, forpasinta aktivulo. Venis kelkaj mesaĝoj, el kiuj unu estis de ILEI-prezidanto *Mirejo Grosjean*, kiu iam gastis ĉe mi duonjaron. Sekvis salutoj de landaj kaj fakaj reprezentantoj. Kiel japana SAT-ano mi informis pri la Komuna Kongreso de Japanio kaj Koreio en Nara en oktobro, en kiu kompreneble okazos fakkunsido de SAT.

Oftaj laborkunsidoj temis pri Jarraporto de SAT, fare de Plenuma Komitato, kies respondeculo estas *Vinko Markovo*. Mi demandis, kial la adresaro de SAT-anoj ne aperis ekde 2013. Respondo: ne pro manko de mono, sed de homforto.

Fakkunsidoj sinsekvis: Ekologiaj aspektoj de veganismo; Infanlibroj je historia, socia, laborista vidpunktoj; Kiel konstrui retan decid-sistemon por sufiĉe facile intervenigi SAT-anojn en ĉiutaga vivo por pli demokratiaj administrado kaj strukturo de SAT?; Landaj retdiskutlistoj estas simptomo de ŝovinismo;

Portreti Zamenhof per branĉeta karbo; Ĉu eblas pere de Esperanto eduki altlerneje en la eksternacia sent- pens- kaj agad-kapablo?; Prezento de gravaj libroj; Pri kreinto de fotografio; Sennaciista frakcio; Verduloj; Eldona Fakoj; Poresperanta Fakoj; Kooperativa Vegetara sekcio, kaj multaj aliaj.

Teatra programo estis tre amuza. Krom la unue dirita teatraĵo "La Kredito" estis "Postnikov", en kiu iu aktorinon kiel Zamenhof.

Dume la urbestro invitis kelkajn kongresanojn en la urbdomon. Interesa diskuto kio estas Esperanto: interetna lingvo, sennacieca lingvo, supernacia lingvo, interpopola lingvo(mi). Kiel vi legantoj opinias?

En la Adiaŭa Vespero mi aŭkciis Esperant-

aĵojn. Mi tre ĝojas, ke la kajereto kun la titolo "Esperanto, la tergloba lingvo" donacia de Aikawa Setuko bone vendiĝis. La vendsumo (unu eŭro + 7800 serbiaj dinaroj \approx 10,000 enoj) eniras en la kason de SAT.

Fine Minoru membriĝis al SAT timante ke se mi pli frue ol li mortos, li estos malSATA en Esperantujo. Verdire mi estis tre kontenta en la SAT-kongreso, pli ol dudekoble malgranda ol la UK, kiu tro grandas por amikiĝi kun ĉiuj. Sola bedaŭrindaĵo estis manko de ŝanco kanti "La Internacio" kun kuraĝiga melodio.

La deklario de la kongreso legeblas ĉe:

<http://www.satesperanto.org/spip.php?article4181>

初心者のための

語尾なし単語の使い方 (70)

相川 節子

相関詞 (2) **tio** (続き)

Mi preparis novan litotukon por tio, ke la gasto dormu agrable.

(お客さまが気持ちよく眠れるよう、新しいシーツを用意した)

Ili parolis mallaŭte por tio, ke la dormanta bebo ne vekigŭ.

(眠っている赤ちゃんが起きないように、小声で話した)

前号で pro tio, ke ~、pri tio, ke ~ の実例をあげましたが、por tio, ke ~ もよく使われます。ke で導かれる従属文が目的を表すときには、動詞が意思法になることにご注意ください。

por tio, ke ~ の場合、よく tio が省略されます。上の文でしたら、次のように言っても意味は同じです。

Mi preparis novan litotukon por ke la gasto dormu agrable.

Ili parolis mallaŭte por ke la dormanta bebo ne vekigŭ.

tio を省略しない文型は、省略した文型に比べて

重々しい感じがします。ただ、そういう微かな違いは、文学鑑賞で問題になることはあっても、日常会話で気にする必要はありません。

tio を省略して por ke としていいのなら、pri tio, ke ~ や pro tio, ke ~ の場合も tio を省略できそうに思えますが、pri ke ~ や pro ke ~ は見たことがありません。ネット上のコーパス (<http://tekstaro.com>) でも見つかりませんでした。使わない方が無難でしょう。

ところで、kio の項であげた例文をもう一度とりあげて、会話の続きを考えてみます。

"Kio estas tio?"

"Tio estas avokadoj".

"Avokadoj? Ĉu ili estas bongustaj?"

"Jes. Mi jam manĝis unu, kaj ĝi estis bongusta."

(「これは何ですか?」「アボカドです」「アボカドですか? おいしいの?」「はい。一個食べましたが、おいしかった」)

同じアボカドをさしているのに、最初の2行は tio で、3行目では ili になっています。つまり、その物の正体が — というのは大げさですが、その物の名前がわかってしまえば、もう tio は使わない。名前が出たあとは、複数なら ili、単数なら ĝi で受けます。

Miaj trezoroj gajnitaj en la UK en Lisbono

TOMIDA Narumi (Kioto)


Mi unuafoje partoprenis en la 103a UK, kiu okazis en Lisbono. Mi partoprenis en kelkaj programeroj, ekzemple la prelegoj pri Portugalio, kaj gajnis du tre grandajn trezorojn.

Dum mi embarasiĝis pro tro multe da partoprenantoj en la kurso de la portugala, unu viro donis al mi seĝon kiun li portis de najbara ĉambro. Kvankam mi dankis lin, mi tre ekstreĉiĝis kaj multfoje stumblis. Sed, li ĉiufoje diris kun rideto, “Ne gravas!” Lia vorto kvietigis min, kaj tiam unuafoje mi povis komuniki kun iu, kiun mi ne konas, en Esperanto. Ni rapide ekamikiĝis, ĉeestis kune la portugalan klason, kaj daŭrigis paroli en Esperanto kaj iomete en la angla (li estas skoto) kun teo, manĝaĵoj, kaj promenado. Li parolis al mi pri sendependeco de sia lando kaj plezuro komuniki kun homoj, kiuj ne uzas la anglan. Kiam mi foriris el la UK, pri mia

danko, li diris, “Vi ne bezonas danki al mi, ĉar mi ĝojas helpi komencantojn.” Tiuj liaj vortoj ege kortuŝis min, kaj komprenigis min, ke la spirito de Esperanto estas tie!

Krome, mi amikiĝis kun korea virino en la ekskurso al *Evora*. Ni parolis malrapide, serĉante vortojn, kiujn ni reciproke sciis, pri diversaj aferoj, ekzemple, familioj, profesioj, reciprokaj rimedoj lerni Esperanton, k.t.p. Niaj vortoj igis nin transsalti la maron inter Koreio kaj Japanio, kaj mi gustis dolĉecon de “refratigo”.

Post la UK, mi komencis korespondi kun ili per retmesaĝoj. Kun la korea virino, mi promesis revidi en *Nara* ĉi-oktobre, kaj kun la skota viro, mi promesis, ke mi iam vizitos lin en Skota nacia kongreso. Por ankaŭ ĉi tiuj celoj, mi volas lerni Esperanton plu de nun.



小西 岳さん追悼

「エスペラント賛歌」のエスペラント訳

伊藤 照子 (東京)

「エスペラント賛歌」の作詞作曲は私の夫・伊藤英明で、私へのプレゼントでした。

1988年札幌で日本大会があったとき、月刊「エスペラントの世界」と共同でTシャツを作り販売していましたから、エスペラントグッズに興味を持ち、それに加えるようにと夫が1985年頃「エスペラント賛歌」を作ってくれたのです。

その頃竹内登美子さんと親しくしており、色々な話から小西先生にエスペラント訳を頼んでみてあげるといってくださいました。エスペラントのことならきっと受けてくださると思うよ、といってくださいだったので、私はお願いしました。

エスペラント賛歌の題名のところだけ私が ESPERANTO HIMNO とちょっと鉛筆で書いてお渡ししたら、これは間違いだと先生が言われたそうで、HIMNO AL ESPERANTO が正しくて AL 2018.10

ESPERANTO を両手で崇めるのだとおっしゃったそうです。

しばらくして訳が出来、歌手に渡して、歌ってもらったらエスペラント発音がダメと言われ、私なりにカタカナでフリガナを付けて歌手に渡しましたが、後半部分の単語が長くてどうしても歌えないので字数を少なくしてもらえないかと希望を先生に電話したら、エスペランチストならちゃんと歌えるんだ!! と強く言われ、その時は直して下さるとは言っただけませんでした。しばらくの間あきらめていたら、別の訳で単語が少なく読みやすいものを作ってくださいました。

カセットテープにおさめ、製品として月刊誌「エスペラントの世界」に載せ、販売を始めました。中国のシェーメイシェンとの縁があり、1990年8月25日の短波の北京放送で放送してもらうことが出来ました。この放送は日本でもよく聞こえました。

このカセットテープは私のエスペラント人生で最高の宝になっています。

Dan-ŝa-ri kaj Mottai-nai

EGAWA Harukuni (Wakayama)

La artikolo “Fortranĉo, forĵeto, forlaso” en Kajero Libervola (La Movado N-ro 810) treege interesis min. Tio temas pri *dan-ŝa-ri* kompare kun *mottai-nai*. La aŭtoro, S-ro Yamaguti, demandante, ĉu ili kontraŭstaras aŭ ne, respondas, ke li ne pensas tiel. Li eksplikas, ke *mottai-nai* estas la sinteno respekti materialojn, ne malŝpari ilin sed uzi ilin kun dankemo, kio fariĝas jam tradicia etikvaloro de japanoj. Eble el la malkonstanteco ke ĉiuj objektoj havas sian finon; nenio eternas. Dume, li klarigas, ke *dan-ŝa-ri* estas ne forĵeti ĉion ajn sed liberigi nin el katenoj kaj eĉ el la vivstilo per *dan-ŝa-ri* kiel unu el katenoj. Ankaŭ li mencias, ke ili koincidas en la punkto ne posedi superfluajn objektojn, intencante pli simplan aŭ minimuman vivon.

Sed nia tempo ŝanĝiĝis de la malriĉa al la ekonomie riĉe kreskinta kun abundaj varoj. En tiu vivmedio *dan-ŝa-ri* altiris nin per ties unikaj vortoj kun la ideo ŝajne mala al *mottai-nai*. Malgraŭ ilia vivmaniero for de la katenoj, *mottai-nai* havas ian sintenon pli ol persisti en objektoj por konservema vivado, dum *dan-ŝa-ri* havas la vivmanieron nepersisti en objektoj por pli bona vivmedio. Tamen, “Ne malŝparu” el la virtoj de *mottai-nai* ofte puŝas homojn troŝparemaj sekve de iom post iom ŝparita mono, kiu ŝanĝas homojn pli avaraj kontraŭ la origino. Fine, la rimedo kiel ŝpari monon por pli feliĉa vivo estas renversita nur al la celo por pli multe ŝpari laŭ des pli akumulita avareco, katenite de “Ne malŝparu”. Tio faras homojn malfeliĉaj.

Japanio konsistas el 73% da montaro kaj 27% da malseka tereno, kies malvasta ebenaĵo estas dividita de riveroj kaj markoloj. Sur la kultivebla tero en Japanio, la longtempe fermata al aliaj landoj, japanoj kiel agrikultura kaj fiksloĝa nacio vivtenadis sin per tie limigitaj materialoj sen investo el aliaj landoj. Do, japanoj devis utiligi ĉiujn materialojn

recikle kiel la vivrimedon, kio fine ŝanĝis eĉ la karakteron por ne forĵeti objektojn.

Japania persisteco obstina al objektoj klarigeblas per japana kimono kiel la ekzemplo. Belega kimono estas tekse elfarita per kotono. Tiun eluzitan kimonon japanoj poste reuzas kiel ŝtofon por litajo. Tiel sinsekvas reuzado de la ŝtofo al tiu por kuseno kaj tiel poste al ŝnuro, al viŝtuko, ktp. La restita ĉifono fininta sian rolon bruligite transformas en cindron kiel la nutraĵon por kotono. Dum tiu cirklado la kotono ludas siajn rolojn ŝanĝante la figuron.

Metempsikozon japanoj lernas ne nur de religia instruo sed ankaŭ en la reala vivo kiel lerte utiligi materialojn. Lertaj fabrikaĵoj de japanoj naskiĝis en tia cirkonstanco. La japana vorto *mottai-nai* signifas “ĉiuj objektoj ne havas fiksitan figuron”. Japanoj pensas, ke ĉiu objekto senĉese ŝanĝas sin kaj laŭokaze plenumas ties utilan rolon. Ĉu influite de animismo, ke ĉiu aĵo en la mondo ludas sian propran rolon por aliaj kiel reciproke necesa estaĵo kun animo nomata “dio” ? Sed ve, eĉ ili pereos iam. Ĉu fenomeno estas vizio?

Kurantaj Vortoj

NHK が映らないテレビ televidilo, kiu ne ricevas ondojn de NHK

大迫、半端ないって Oosako estas sendifekta soĉo — Prave! (Vi pravas!)

もぐもぐタイム tempo de maĉado

#MeToo #AnkaŭMi (ツイッターのハッシュタグ)

億り人 miliardulo (ビットコインで大儲けした人)

ひょっこりはん Abruptulo

悪質タックル malica ĉirkaŭkaptado

公文書改竄 falsado de oficiala dokumento

雑草軍団 teamo de sovaĝherboj

〇〇のドン・ファン donjuano de XX

仮想通貨バブル bobelo de virtuala mono

カメラを止めるな Ne interrompu filmadi!

裏口入学 neleĝe akceptiĝi (en universitaton)

インフルエンサー influhava persono

日韓共同開催エスペラント大会公開番組

日時：2018年10月13日(土) 13時半～17時
場所：奈良県文化会館 国際ホール

入場無料。記念文化講演会「日本における仏教文化の成立」奈良県立図書館館長・国際日本文化センター名誉教授 千田稔さん、バレエスタジオ・エスペラントの皆さまのバレエ披露、講演『『三国志』からみる東アジア現代国際情勢』鶴見大学教授・京都大学名誉教授 金文京さん。

日韓共同開催大会講師紹介

奈良県立図書館館長 千田 稔さん

「日本における仏教文化の成立」



学生時代「仏教伝来は(529年)午後(538年)ご参拝」と覚えたものです。仏教導入については推進派の蘇我氏と神道派の物部氏の対立があったことも習いました。今では仏教文化は日本文化の一部になっています。インド(又はネパール)で生まれた仏教が中国大陸、朝鮮半島を経て日本に伝来し、どのように日本の風土に適合して日本の仏教文化が生まれて行ったのか、解きほぐしていただきます。

紹介：現奈良県立図書館館長。1942年奈良県

La Movado-La Movado-La Movado-La Movado-La Movado-La Movado-La Movado-La Movado-La Movado-La

田平正子さんリスボン UK で表彰

リスボンで開かれた第103回世界エスペラント大会でエスペラント運動に貢献した14人の表彰があり、田平正子さんが永年にわたるさまざまな活動により表彰された(発表時本人は不在)。UEAの公式広報：Masako Tahira (Japanio) pro la longdaŭra laboro por Esperanto, aparte en la kampoj tradukado kaj reviziado kaj pro la elstara aktivado en la Kansaja regiono; krome pro la plurjardeka engaĝiĝo en la ĵurio de Oratora Konkurso。 [←萩原 洋子、柴山 純一]

土曜エスペラント会

8月18日 JEI 会館で開催。夏の暑さにもかかわらず
2018.10

生まれ。京都大学大学院文学研究科博士課程を経て追手門学院大学助教授、奈良女子大学教授を経て国際日本文化研究センター教授。国際日本文化研究センター名誉教授。濱田青陵賞、日本地理学会優秀賞、奈良新聞文化賞、古事記出版大賞を受賞。『平城京遷都—女帝・皇后と「ヤマトの時代」』(中公新書)他著書多数。2010年に奈良で開催した第58回関西大会においても「平城京と遣唐使」で講演した。

鶴見大学教授 金 文京さん

『『三国志』からみる東アジア現代国際情勢』

現在、朝鮮半島、日本、中国をめぐる緊迫した国際情勢が展開していますが、これについて、問題は、近代以降に起ったので、近代以前には遣唐使や朝鮮通信使に象徴されるように友好的であったという人もいます。しかし東アジアの国際関係は古代から重大な矛盾をはらんでいました。本講演では、この問題について、原点となる中国の三国時代と『三国志』の視点からお話したいと思います。



紹介：1952年、東京生れの在日韓国人。専門は中国文学。現在、鶴見大学日本文学科教授、京都大学名誉教授。著書に『『三国志演義』の世界』(東方書店)、『『三国志』の世界』(講談社)、『漢文と東アジア』(岩波新書)など。

ら 11 人出席。多彩なテーマで、エスペラント漬けの2時間半だった。『コンビニよりも多い歯科医院』『コソボの楽器』『母の遺品』『遅い者勝ち』『小浜』『中学生にとってのE』『ボール紙で作ったコンピュータ・キャビネット』『しっぽがわらう(絵本)』。毎月原則第2土曜日午後(15時15分～17時45分) JEI 会館で開催。 [←山川 修一]

共同開催大会の切手

前川治哉さんが日韓共同開催エスペラント大会の切手6種類を作成した。奈良の大会会場で入手できる。



長谷川テルを知る会 早稲田の SOJO にて

9月22日(土)17時～20時 Esperanto-Vegana Kafejo SOJO (早稲田鶴巻町)で「長谷川テルを知る会」を予定。参加費千円(本「テルの生涯」利根光一著・ソフトドリンク1杯を含む)長谷川テルは、奈良女子大学にも在籍した戦中のエスペランティストで、中国で反戦放送をするなど、国際平和主義に徹した人物。 [←北川 郁子]

「ことのはアムリラート」1周年

エスペラントを異世界で学習する設定のゲーム「ことのはアムリラート Amrilato」(<http://sukerasparo.com/>)一周年にあたって、多くのエスペラント会が祝意を表した(25のエスペラント団体・個人が、ツイッターで美しい絵入りで紹介されている)。公式ページによると、続編「いつかのメモラージョ Memoraĵo」が2018年秋発売予定、鋭意制作中とのこと。 [←堀 泰雄、福田 政則]



ロンドの活動

高知エスペラント会:6月21日(木)の定例会は、さくら教育放送の入門講座を最初から。“Esperanto, Pasporto al la tuta mondo” 1と2、高知エスペラント会の草創期の紹介(第1回)。 [←小坂 清行]

香川エスペラント会:三好鋭郎さん(欧州エスペラント連盟名誉会員)は副会長から名誉会長に。香川エスペラント会の年会費は、今まで5000円～1000円としていたが、会計に余裕があることなどの理由により、当分の間無料とすることになった。学習内容は、今までR.O.の記事を読んでいたが、ザメンホフの演説集を読むことに。ザメンホフ祭は12月16日(日)。 [←小坂 清行]

宮崎エスペラント会:例会8月4日(土)14時～15時半宮崎市民活動センターで。La Movado 配付、輪読“Vivo de Zamenhof”。担当近藤。8月25日(土)La Movado 配付、輪読“Vivo de Zamenhof”。担当丸山。 [←近藤 方彰]

ポルトガル語会話帳プロジェクト速報

世界大会の開催地において「現地語で挨拶もできない」では、現地人に対する礼儀、およびエスペラント宣伝において不利ではないか、という提起から佐野寛さんが昨年12月末メーリングリスト ERAJ で公募して「Esperanto ポルトガル語会話帳」プロジェクトを始めた。2018年1月までに7人の支持・協力者を得て、同時に30数句のエスペラント・ポルトガル語例文が集まった。既成の旅行会話集などでは20例文以下なので、各例文の「需要度」を推定して絞り込んだ。

エスペランティスト専用なので対比表で日本語は使わない。発音は近似音カナ表記を基本として(ポルトガル語は比較的無難)、どうしてもはみ出す「曖昧音」は「ひらがな表記」で救済した。さらに発音を深掘りしたい向きには、音声付きMP3版を用意した。

ERAJ や各種会合を通じて試験版を発表し、修正を重ねた。5月末の関西エスペラント大会で最終版とし、希望者への配布を開始した。

7月末、UK 開始前には ERAJ を通じての注文、直接注文、会合での手渡し、など各6件、UK 開始後には手渡し約15件、総計33件配布。「UK 不参加だが語学的興味で」との方が四分の一いた。8月6日 JEI の UK 旅行団の解散で終了した。

現地では、オラー、オブリガード、チャオ=やあ、ありがとう、さようなら、の3語が圧倒的に役立った。中でも「チャオ」の「にっこり効果」が絶大な潤滑油になった。 [←佐野 寛さんの報告から編集部がまとめた]

訃報: 佐々木 安子さん

8月20日未明、老衰のため逝去。享年94歳(1923年8月24日生)。吹田エスペラント会会員。人形劇等で活躍。EVA (Esperanta Virina Asocio) でも活動、『EVA50年の歩み』を編集した。

Vortkruca enigmo

Redakcio

Vicigu adekvate 8 literojn trovitajn en la kvadratetoj kun steleto. Tiam vi akiros vorton, kiu estas uzata en fervojo kaj en poŝto.

Sendu la trovitan vorton kiel solvon de la enigmo ĝis la 20-a de oktobro, paperpoŝte al la oficejo de KLEG, aŭ retpoŝte al <lamovado@gmail.com>.

Rimarko: (x) signifas, ke la vorto ne portas finaĵon.

1	2	3		4		5	6	*
7			*			8		
		9	10		11			
12	13	*	14					15
16	*					17	18	
19					20	*		
		21		22			23	
			*					
	24				*	25		
26				27				

Horizontale: 1. Esperantistoj nomis Zamenhof “~o”, sed li ne deziris la titolon.(x) 5. Subjunkcio.(x) 7. La interna ~o de Esperanto estis grava por Zamenhof.(x) 8. “Bonan ~on!” estas kutima saluto de esperantistoj.(x) 9. La hartondisto pene tenis la ~on, ke la reĝo Midaso havas azenajn orelojn.(x) 12. Gramatika finaĵo de preterita verbo.(x) 14. Ĉevalo estas tiel fidela ~ hundo.(x) 16. La ĉefurbo de Korea Respubliko. 17. Laŭ kristana ~o nun estas la 2018-a jaro.(x) 19. Mallongigo de “tiel nomata”.(x) 20. Leporo havas longajn ~ojn.(x) 21. Juvelŝtono, ofte blu-verda.(x) 23. Pronomo vira.(x) 24. Salmo ~iĝas en rivero kaj kreskas en maro.(x) 26. La 12-a horo estas 2018.10

tag~o.(x) 27. Ĉi tiu trajno konsistas el dek ~oj.

Vertikale: 1. Membro de registara kabineto.(x) 2. Sufikso signifanta daŭrantan aŭ ripetatan agon. 3. Vorto esprimanta konsenton.(x) 4. La ĉefurbo de Japanio. 5. Dombesto, kiu miaŭas.(x) 6. Vent~o estas tre forta vento.(x) 8. Ujo por manĝaĵo tre malprofunda.(x) 10. En suna ~o la luno kaŝas la sunon.(x) 11. Ĝis ~vido!(x) 13. Ne ekzistas fumo ~ fajro.(x) 15. Kancero estas ~a tumor.(x) 18. Trajno iras sur ~oj.(x) 20. Pli feliĉa estas donanto ~ prenanto.(x) 21. Loko kun akvo kaj verdaĵoj en dezerto.(x) 22. En la sunsistemo la tero estas sola planedo, kiu estas kovrita per ~o.(x) 24. Vorto esprimanta malkonsenton aŭ malakcepton.(x) 25. Kontent~i ĉiujn eĉ anĝelo ne povas.(x)

La solvo al la aŭgusta enigmo: TELEFONO

La ĝustan solvon donis 13 legantoj:

CA、

濱田 國貞、

sayuri、

TADA、

Grebo、

西 千寿子、

久保田 俱視、

平井 倭佐子、

にしのりこ、

前藤 寛、

本田 照美、

武藤 たつこ、

Kacu

K	O	N	D	U	K	T	O	R
A	V	A	R	E		R	E	
S		S	I	D		B	E	L
T	E	K	N	I	K		L	I
E	M		K	A	R	E		G
L	E	V		M	E	N	C	I
	R	I	L	A	T		E	
F	I	N		N	A	L	E	
E	T		A	T	E	N		L

楽しい作文教室 (86) 成績

12 人の方から応募がありました。() 内は留意事項です。

うん、良いね : Yo(komptilo), Ivajo, ikona (komptilo)。

良いね : Drako, AG(movi), Celejo(① 対格), T.Ku (④ koputilo), Eiko, CA(movi), Fumi, haveno (movi), ヒー坊 (kravaro)。

もうひといき : 無し。

Mikspoto (当欄は敬称略)

★今年の長崎平和宣言を広高正昭がエスペラントに翻訳して、http://www.vastalto.com/arkivo/Pacdeklaro2018_Nagasaki.htmlに掲載した。長崎市のウェブページからもエスペラント版のページにリンクされた：<http://www.city.nagasaki.lg.jp/heiwa/3020000/3020300/p031606.htm>

[←広高正昭]

★作曲家の小林亜星が終戦の日にあたりインタビューにこたえたウェブ記事が「文春オンライン」に載った。母について「家でエスペラント語講座なんて開いちゃってさ、特高が来たことありますよ」と。<http://bunshun.jp/articles/-/8587> [←柴山純一]

★亡くなった第7代国連事務総長コフィ・アナンについて、在任中に世界エスペラント大会に挨拶文を送って来てくれたこと等、元UEA事務局長 Osmo Buller がフェイスブックで語っている。<https://www.facebook.com/1012878172/posts/10214487384111037/> [←北川郁子]

★京都地域 FM 局「京都三条ラジオカフェ FM79.7」の番組「エスペラントって何？」の8月8日の放送では京都エスペラント会の富田成美が「世界大会にはじめて参加して」と題して話した。次の URL から聞ける：<http://radiocafe.jp/201603001/episodFMes/2018-8-8oa/> [←山野敏夫]

楽しい作文教室12月号課題(10月20日締切)

- ①猫は活発に後ろに跳ぶ。
- ②(さっと) 腹ばいになって腰を振る。
- ③彼はプログラムのインストールを断念する。
- ④ノートパソコンの電源を切る。

(ヒント) 前月号の続きです。活発に *vigle*、腹 *ventro*、腰 *lumbo*、*kuŝi*、*svingi*、*ŝalti* を調べましょう。日本語の原文の内容が、相手にはっきり伝わるように考えて訳してください。

送付先：

[郵送] 〒 674-0092 明石市二見町東二見 515-1-811 塚本 猛

[電子メール] c_tak@esperanto.ne.jp
(件名に「作文」の文字を入れてください)

添削は受け付けておりませんのでご了承ください。

KLEG 事務局だより

★ La Movado 今月号は、第2回日韓共同開催エスペラント大会参加者に無料で配布されます。初めて手に取る方もいらっしゃると思います。

気に入ったら、ご購入いただくと、うれしいです。

年12回発行されている機関誌です。まわりの方に購読をお勧めください。

★日本郵便(株)からゆうメール料金(特別)の値上げの通知がありました。12月から会員、読者の皆さまへの書籍の送料を値上げせざるをえなくなりそうです。

具体的な金額が決まり次第、お知らせします。

★今年も KLEG 合同ザメンホフ祭は開催しないことになりましたので、各地で準備をお願いします。

★ザメンホフ祭で購入したい書籍・CD がありましたら、早めに事務局にご連絡ください。取り寄せます。

★第2回日韓共同開催大会を目前にして、タイミングよく “Septembre, surstrate en Tokio” が出版されました。

加藤 直樹著、間宮 緑訳、2160 円。95 年前の東京で、関東大震災直後に何が起こったのか、読まずにはおられません。

第92回九州エスペラント大会

期日：2018年10月20日(土)～21日(日)
会場：熊本市国際交流会館

第19回中国・四国エスペラント大会

期日：2018年10月27日(土)～28日(日)
会場：国民宿舎「仙酔島」(広島県福山市)

第2回日韓共同開催エスペラント大会





第105回日本エスペラント大会
第50回韓国エスペラント大会

La 2-a Komuna Esperanto-Kongreso
de Japanio kaj Koreio

La 105-a Japana Esperanto-Kongreso

La 50-a Korea Kongreso de Esperanto

日時 2018年10月12日(金)～14日(日)
会場 奈良県文化会館



★ 新刊・新着 ★

Esperanto版 九月、東京の路上で 2160円
 関東大震災時の朝鮮人虐殺を描くノンフィクション(加藤直樹著)を間宮緑が翻訳。現代に残響する忌まわしい声に抗う。A5版、208p.

Murdo en la parko 1000円
 捜査の進展につれて謎を深めていく銃殺事件。Julian Modestの原作推理小説。A5版、78p.

Al eterna paco 1300円
 カント『永遠平和のために』(P. Christaller訳)。国連創設にも影響をあたえた一書。1924年に発行された訳書の復刻版。A5版、80p.

La lanternistoj 2200円

Patroj kaj filoj 4000円
 Kabeの翻訳が再登場。前者はシェンキエヴィチの表題作など10作品に、文芸誌“Literatura Mondo”による有名なインタビュー記事“Kion diris s-ro Kabe?”と第1回UKでの演説を併載(A5版、136p.)。後者はツルゲーネフの『父と子(第3版)』(A5版、263p.)

Noveloj (de Sienkiewicz) 1200円
 リディア・ザメンホフ翻訳のシェンキエヴィチの小説集(第3版)。初版は1925年。A5版、69p.

★ 深めるEsperanto ★

Ekzercoj de Zamenhof 300円
 「Esperanto基本文例集」。Zamenhofの“Ekzercoj”と“La Feino”を峰芳隆が再編集。

考えるEsperanto文法 900円
 小西岳著。『Esperanto文法の散歩道』に未収

録の文法に関する文章を三部に編集して収める。

★ 在庫から ★

Fundamento de la homaj rajtoj 1000円
 「世界人権宣言」「国際人権規約」を収録。

Paĉjo, kio estas rasismo? 650円
 ベン・ジェルーンの『娘に語る人種差別』。

★ 再入荷(一部価格を変更) ★

Amo inter ruinoj 2200円

La apologio de Sokrato 1500円

Esperanto Mini-Dictionary 300円

Fajra amo 1300円

Kritono 1500円

Laŭdo de l'stulteco 800円

Naturaj vortordoj en Esperanto 700円

La princo 1600円

Pro kio? 1800円

Proverbaro esperanta 900円

Winnie-la-Pu 1800円

ご注文は郵便、ファクス、電子メールで。送料は実費。現品と一緒に請求書を送ります。支払いは振替口座で。

編集ノート

★ 9月号“Kajero Libervola”の“ekster-legula”は“ekster-regula”に訂正します。
 ★ 9月号“Kurantaj Vortoj”の「阿修羅」は「日本語Esperanto辞典」では“Aŝuro”ですが、Vikipedioでは“Asuro”ですので、“Asuro”に訂正します。興福寺の阿修羅像は三つの頭それぞれに顔があるので「三面六臂」の「三面」は“tri kapoj”または“tri vizaĝoj”です。
 ★ 今月号から“Kajero Libervola”の執筆者に福田 誠さんが加わりました。(相川 節子)



発行所：ラ・モバード社 編集：相川節子 発行人：染川隆俊 定価280円 送料62円 1年3800円 送料共本
 局：一般社団法人 関西Esperanto連盟内 561-0802 豊中市曾根東町1-11-46-204
 電話(06)6841-1928 ファクス専用(06)6841-1955 電子メール：esperanto@kleg.jp
 振替口座 00960-1-60436 「一般社団法人 関西Esperanto連盟」 ホームページ：http://www.kleg.org
 九州支局：九州Esperanto連盟内 859-0407 長崎県諫早市多良見町シーサイド2-190 盛脇保昌方 電話(0957)43-4352
 中国四国支局：中国四国Esperanto連盟内 771-0371 徳島県鳴門市北灘町榎木字観音面14-1 木谷拳子方 電話(088)688-1098